

Enkonduka prelego

Busano, KR, 50-a Kongreso de ILEI

Mireille Grosjean

Edukado al respektoplena turismo

En la jaro 1985 mi vizitis Japanion unuan fojon kun mia edzo kaj niaj du filinoj en la aĝo de 7 kaj 9. Ni ne sciis, kio estas Esperanto... En iu templo niaj filinoj renkontis aliajn infanojn, japanajn infanojn, kaj ili komencis ludi kune. Ni restis tie dum pli ol unu horo por ebligi tiun belan kontakton. Dume alvenis buso, karavano de kurantaj turistoj, al kiuj la ĉiĉerono kriis : « Bonvole revenu al la buso post 20 minutoj. Ni tuj startos ! » Mi estis feliĉa, ke ni ne partoprenis en grupa turismo.

Jen ni jam vidas du tipojn da turismado : **individua** aŭ **grupa**. Veturi, elbusiĝi, foti, kuri, foti, enbusiĝi.... Jen grupa turismado. Matene Romo, posttagmeze Venecio... Turistoj - kuristoj. Ofte tute ne okazas ia kontakto kun la loĝantoj de la regiono. Se vi loĝas en kvarstela hotelo en Kinshasa aŭ en Vankouvero, ili similas unu al la alia. Vi ne gustumos la regionon, eĉ ne la klimaton, ĉar kompreneble tia hotelo havas klimatizilon. La unua paŝo al malkovro de alia lando estas la kuirarto, la gastronomio. Tamen ĉinaj turistoj ŝatas manĝi ĉine en Romo au Venecio....

La **vorto turismo** venas el la angla. Tamen la baza radiko « tour » venas el la franca kaj signifas rondiradon. Oni revenas al sia stratloko. Nuntempe la vorto **turist** aperas en plej diversaj lingvoj. Do ni konstatas, ke ne nur homoj vojaĝas, ankaŭ vortoj vojaĝas. Venis propono pri esperanta vorto : *fremdultrafiko*.

Kio estas turismo ? Se iu ĉarpentisto vojaĝas por pli lertiĝi en siaj profesiaj kapabloj, tio ne estas turismo. Se iu profesoro vojaĝas por fari prelegturneon, tio ne estas turismo. Se iu vendisto vojaĝas por trovi klientojn kaj vendi iujn varojn, tio ne estas turismo. Se iu soldato ricevas taskon iri al iu lando por batali tie, tio ne estas turismo. Se pastro iras al fora lando por disvastigi sian religion, tio ne estas turismo. Se iu fuĝas el sia lando por trovi en alia lando pli bonajn vivkondiĉojn, tio ne estas turismo. Se iu pilgrimas al 88 temploj tra la insulo Ŝikoku en Japanio, tio ne estas turismo. **Turisto volas vidi iun regionon, malkovri ĝin.** Kutime tio okazas dum la ferioj aŭ post emeritiĝo. Turismo estas

portempa restado en lando por viziti gefamilianojn, malkovri la landon, ties kulturon, naturon, popolon. Kongresumi estas io alia : la celo estas lertiĝi, kunveni kaj iom turismumi ankaŭ.

Kompreneble iu persono povas, sidante hejme, spekti filmojn ĉe televido pri foraj landoj aŭ aŭdi priskribojn per radio. Tamen mankas al tiu persono odoroj, temperaturo, humideco, tuŝado, gustoj, kuloj.

Turisto devas havi **tempon kaj monon**, ĉar la vojaĝo kostas. Do multaj homoj ne povas turismumi. Kamparano, kiu havas bovinojn, ne povas turismumi, ĉar li ne havas feriojn. Turismado estas **luksa** okupo. Plie eĉ riĉaj homoj foje ne povas turismumi, ĉar ili ne sukcesas akiri vizon por eniri certan landon.

Nur 10% de la terloĝantoj povas turismumi, havas tempon kaj monon por tio. 10% de tiuj turistoj vojaĝas por seksumadi ie en la mondo ekster sia kutima loĝloko. 20% de turistoj vojaĝas komercele. 10% de la terloĝantoj laboras en rilato kun turismo kaj pergajnas sian vivon per tiu okupo. Do turismo estas granda ekonomia sektoro.

Turismo tre koncernas min unue ĉar mi multe vojaĝas kaj devas analizi la kialojn de tio kaj organizi miajn saltojn racie ; due ĉar turismo estas la tria enspezofonto de mia lando Svislando. En mia vilaĝo mi konstante renkontas turistojn, salutas ilin, helpas ilin per transdono de informoj en diversaj lingvoj. Kun rideto kaj ĝentileco. Ni estas edukitaj al tio.

Mi legis, ke tiu, kiu vojaĝas, havas ion por rakonti kaj akiras presiĝon. Diversaj aŭtoroj substrekas, ke la vojaĝanto povas beligi siajn raportojn, ĉar la aŭskultantoj ne povas kontroli la veron. Diversaj vojaĝantoj, ekzemple Hans-C hristian Andersen, la fama dana poeto, agnoskas tiun beligon.

Ni vidu klare : tutmonde ekzistas du institucioj : WTO kaj UNWTO.

World Trade Organsation = Tutmonda Komerca Organizo (Ne UN)

United Nations World Tourism Organisation = Monda Organizaĵo pri Turismo (UN)

(Mi citas el vikipedio) « UNWTO grupigas 156 membro-ŝtatojn. Plie membras en ĝi proksimume 400 ligitaj membroj, kiuj reprezentas la privatan sektoron, edukajn instancojn, turismajn asociojn kaj lokajn turismajn aŭtoritatojn, ne-registarajn organizojn, kies agadoj iel ligiĝas al turismo, komercajn kaj ne-

komercajn firmaojn iom ligitajn al turismo ». Mi legis, ke UNWTO estas la plej granda ne-ŝtata stablo, pli granda ol Universala Poŝta Unio kaj Interpol, la tutmonde aktiva polico.

La sidejo de UNWTO estas en Madrido, Hispanio. En la jaro 2018, kiam ILEI kongresos en tiu ĉefurbo, eble ni devus iri prezenti Esperanton al tiu tutmonde aganta instanco.

Grava agnosko de Esperanto

Tiu instanco UNWTO substrekis la valoron de Esperanto en sia deklaro de Manilo, ĉefurbo de Filipinoj, de la jaro 1980 :

« **The World Tourism Organisation Underlines in this respect the importance of knowledge of languages notably those with a universal vocation such as esperanto.**

La Monda Organizaĵo pri Turismo substrekas cele al respekto la gravecon havi konojn en lingvoj, ĉefe en lingvoj kun universala uzocelo kiel estas Esperanto. »

Historiaj aspektoj

En la mezepoko estis la tri K : konkeristoj, krucmilitistoj, koloniistoj. En la deknaŭa jarcento montriĝis, ke kelkaj britoj havis tempon kaj monon kaj komencis malkovri la mondon. Oni plie provis kuraci diversajn malsanojn per restado ĉe la maro aŭ en montaro. Tiam turisma industrio ekfloris kaj plu floras ĝis nun. Venis en la dudeka jarcento leĝo pri ferioj por ĉiuj laboristoj, kio stimulis turismon. Ĉirkaŭ 1960 komenciĝis amasa turismado.

Turismo estas enspezo por multaj homoj kaj landoj.

Ĉu per mastrumado de restoracio, ĉu per ekspluatado de hotelo, ĉu per laboro en trajnoj aŭ aliaj transportiloj, multaj homoj gajnas sian vivon laborante por turistoj. Kiam okazis atenco en Tunizio, la turisma industrio malkreskis kaj senigis multajn homojn de iliaj vivrimedoj. Same kiam okazis tertremo en Katmanduo, Nepalo, kaj detruigis multaj monumentoj valoraj. Same pri tsunami en norda Japanio. En tiaj tragikaj momentoj oni povas mezuri la forton de la turisma sektoro. 10% de la terloĝantoj vivas kaj laboras en tiu sektoro, ĉar turismado estas industrio kun profitdonaj leĝoj, dungantoj kaj dungitoj. Konstruado de stratoj por turistoj ankaŭ utilas al lokanoj.

Turismo faras viktimojn.

En diversaj lokoj oni ŝovas vilaĝojn por prepari skiadvojojn, por konstrui hotelojn, por konstrui stratojn. Ofte oni ĝenas la vivon de bestoj kaj eĉ detruas partojn de naturo. Telfero alportas turistojn al Aiguilles du Midi, apud Monto Blanka, en la Alpoj, al alteco de 3850 metroj. Ĉu tio nepras ? Pigraj turistoj pagas helikopteron por atingi montajn pintojn. Ĉu tio nepras ? La indiĝenoj kaj la naturo fariĝas viktimoj de tiu industrio. Turismo estas movebla branĉo de internacia kapitalismo. Indiĝenoj malkovras teknikilojn kaj poste volas uzi ilin. Do multjara ekvilibro rompiĝas. « Turismado mortigas tion, kion ĝi deklaras ami. » « Norduloj eksplodas. Suduloj ekploras kaj suferas. » Pierre Lotti, franca verkisto, skribis : « Iu lando, kiu malfermas sin al turismo, perdas sian dignecon. »

Ne ĉiuj homoj ŝatus turismumi.

Ekzistas homoj kun ferioj kaj mono, kiuj povus turismumi. Tamen ili ne faras. Povas esti, ke iliaj hejmaj devoj, ĉu familiaj, ĉu politikaj, malebligas tian forvojaĝadon. Povas esti timo al alia klimato, temperaturo, humideco aŭ sanaj konsideroj. Povas esti timo pri juĝoj : Kiel mi vidos la indiĝenojn ? Kiel ili vidos min ? Rezulte : kiu mi estas ? Povas esti ne sufiĉa scivolemo. Do plej bone mi restu hejme en konata mondeto.

Turismo havas diversajn celojn.

En riĉaj landoj kiel Svislando kaj Japanio ekzemple oni organizas lerneajn ekskursojn por plenaj klasoj. Tiel infanoj kaj junuloj ekkonas sian landon, vizitas naturajn vidindaĵojn, urbojn, muzeojn, kastelojn. Ĉu tiel ili akiras vojaĝemon, mi ne scias. Oni povas esperi, ke sub la gvidado de siaj instruistoj ili lernas, kiel konduki en fremdaj lokoj.

Multaj homoj havas la celon viziti urbojn kaj muzeojn. Aliaj volas promeni en naturo. Aliaj, ekzemple Eŭropanoj, volas ĝui la maron kaj bruniĝi kuŝante en suna loko. Aliaj volas ripozi en kvietaj loko kaj legi ade. Aliaj volas ion sperti : ĉu veturi sur rivero per boateto, ĉu salti el ponto en abismon sen vundiĝi pro helpo de gumŝnuro, ĉu flugi alten kaj salti per paraŝuto. Tio estas turismado kun « evento », travivaĵo, kiu timigos vin aŭ ligos vin al via skipo. Ekzistas

amuzparkoj kiel Disneyland, kiuj fariĝas vojaĝceloj. Nun aperas nova stilo : turismado kun helpa aktiveco en Afriko ekzemple, konstruante domon aŭ flegante georfojn. Kelkaj ne registaraj organizoj starigas tiajn programojn. Bonfarado fariĝas komerco. Personoj pagas por iri labori. Tamen venas kritikoj, ke tiaj partoprenantoj forflugas sen iaj preparoj kaj la kontaktoj kun la lokanoj ne nepre okazas pozitive.

Kerna problemo naskiĝas, kiam turistoj volas malkovri ne tuŝitan regionon, kiun ili damaĝas en la momento de sia apero. Tio estas la paradokso de turismo : oni volas trovi originan pejzaĝon, edenan ĝardenon, kaj alvenas grupe detruante multon. Okazas eĉ, ke oni rekonstruas por turistoj folkloran vilaĝon, kie junuloj ricevas punon, se ili uzas sian poŝtelefonon, kiam ili devas aperi kiel kvazaŭ sovaĝaj homoj... Ĉar turismado estas industrio, kun profitdonaj leĝoj. 90% de la profito de tiu industrio iras al la Nordo. Oni povas diri, ke turismo estas moderna koloniado. La turisma planedo similas al superbazaro. « Vi devas esti vidinta la Eiffel-turon en Parizo. Se ne, vi estas freneza aŭ stulta aŭ ambaŭ ». La urbo Barcelono en Katalunio nuntempe provas eĉ limigi turismon, kiu damaĝas la urbon kaj vivon de la lokanoj. Ĉiĉeronoj montras al vi tion, kion vi devas vidi laŭ decido de la registaro. Fakte mankas sciencaj esploroj pri la fenomeno turismo.

Estas diversaj manieroj turismumi.

Se mi havas gastojn, mi unue demandas : ĉu vi volas promeni en la naturo, ĉu vi volas vidi grandajn urbojn, ĉu vi volas viziti muzeojn ? Lau ilia respondo mi planas la tagojn, kiujn ni pasigos kune en la regiono, kiun mi konas kaj kie mi loĝas. Ne ĉiuj turistoj havas la samajn emojn.

Mi konas junajn svisojn, kiuj flugas vendrede vespere al Dublino, Irlando, por gustumi bierojn kaj ili revenas dimanĉe vespere por labori lunde matene. Mi aŭdis svison diri : mi estis en Japanio, feliĉe mi povis fojfoje manĝi en MacDonald aŭ Starbucks Kafe... Kion vi opinias pri tio ? Mi opinias, ke tio estas stulta sinteno. Flugi malpurigas la aeron. Kelkaj homoj kritikis min pro mia troa uzo de aviadiloj... Do kion fari ? Ĉu miaj vojaĝceloj estas pli valoraj ol biertrinkado en Irlando ? Jen la demando. Se mia vojaĝo en Eŭropo estas malpli ol 1000 kilometrojn longa, mi preferas uzi trajnon. Mi tre ŝatas la noktajn trajnon. Sed la trajnkompanioj ĉesas organizi ilin, bedaŭrinde. Uzi trajnon (kiu

uzas elektron el akvoenergio) aŭ aviadilon (kiu konsumas nafton), tio estas grava decido, ĉar tio havas influon sur la sanstato de la planedo Tero.

Eblas turismumi en grupo, en organizita rondirado. Turistoj – kuristoj. Eblas viziti landon loĝante ĉe indiĝenoj. Okaze de kongresoj esperantistoj devas uzi hotelon, ĉar la lokaj esperantistoj laboras por la organizado de la kongreso kaj ne povas samtempe gastigi eksterlandanojn. Ekster la kongresoj eblas loĝi ĉe la familioj en la vizitata lando. Do por esperantistoj estas du malsamaj situacioj.

Jen citaĵo de Roger Bastide, franca sociologo : « Okcidentano volas ĉion scii tuj, pro tio li ne sukcesas ion kompreni. » La malfermiteco kaj scivolemo varias de kontinento al kontinento. Eŭropanoj kutimas esti raciaj kaj pragmataj ; ili ŝokiĝas en Azio, ĉefe en Barato. Franca verkisto Régis Airault skribis : « ĉu Azio frenezigas eŭropanojn, aŭ ĉu eŭropaj frenezuloj iras al Azio ? » Eŭropanoj ankaŭ povas esti arogantaj kaj rasismaj. Mi aŭdis en Nepalo, ke svisoj agadas aĉe kun ŝerpoj. Ŝerpoj estas lokanoj, kiuj gvidas eŭropdevenajn grimpantojn al Himalajo. Eŭropanoj dungas ilin. Eŭropanoj ne konas la regionon, la klimaton. Do ili devas « obei » al la ŝerpoj. Ŝerpo diras : ni ne iru hodiaŭ al la pinto, sed nur morgaŭ. Ŝajnas, ke svisoj kutimas postuli ion de dungito. Tamen tia dungito havas la bezonatajn sciojn. Naskiĝas konfliktoj.

Mi legis kaj konstatas, ke gastamo malaperas en Okcidento. Gastamo signifas senpageco kaj reciprokeco. Io alia ol turismo.

Turistoj apartenas al diversaj kategorioj. Kelkaj estas saĝaj kaj scivolemaj. Aliaj volas ebriiĝi : vidu la vortojn : Romo, rumo, ktp. Mi jam aludis al porseksa turismado, kie ofte infanoj estas viktimoj de perversaj plenkreskuloj. Foje turisto estas homo, kiu volas nur fuĝi el rutina vivo aŭ malfeliĉa familia vivo. La turisto preferas la rutinon de iu alia de sia propra rutino. Ordinaraĵoj de indiĝeno fariĝas eksterordinaraĵoj de vojaĝanto. Por kelkaj homoj eskapi estas la celo. Tia persono ne sukcesos rilati pozitive kun indiĝenoj. Iu homo devas havi fortajn radikojn kaj koni ilin por sukcese ek rilati kun alia homo.

Preparlegado

Por prepari tiun prelegon, mi legis diversajn librojn kaj retpaĝojn. Du ĉefaj aŭtoroj okupis mian legadon : Rodolphe Christin kaj Franck Michel. Jam longe antaŭe mi legis verkojn de Nicolas Bouvier kaj Kenneth White. En la deksesa jarcento franca verkisto Montaigne skribis : « Homo faras vojaĝon, vojaĝo faras

homon. » « Oni lernas vojaĝi vojaĝante » Franck Michel. « Al streĉita homo streĉita vojaĝo. »

En ĉiuj libroj aperas la sama sugesto : estus bone, ke la turistoj venu en kontakton kun la lokanoj, la indiĝenoj. Sed neniu aŭtoro mencias la demandon : per kiu lingvo ili ekrilatu ? Stranga konstato ĉu ne ?

Ni scias, ke ni povas kontaktiĝi kun la loĝantoj de la vizitata lando per nia lingvo Esperanto. Ni estas bonŝancaj. Tamen venas ankaŭ demando : laŭ kiu tono ni parolos ? Kion ni demandos ? Kiajn rimarkojn ni faros pri la lokaj kutimoj ? Havi komunan lingvon ne nepre signifas respektoplenan kontakton. Esperanto ankaŭ povas utili por insulti aŭ vundi.

Ankaŭ vojaĝantoj preparas sin per legado pri la cellando. Ili akiras ian bildon, imagon, kiun ili devas poste adapti al la objekte akiritaj konstatoj. Tia preparado estas la unua paŝo. Sekvas la vojaĝo mem, la dua paŝo. Poste venas la raportoj, ordigado de fotoj, prelegoj pri la vizitata lando, tria paŝo.

Turismumi malstabiligas.

Turismado povas alporti skuon al iu individuo. La persono post malkovro de aliaj vivkondiĉoj starigas demandojn al si mem pri sia vivmaniero. Aŭskultu ! Kiam mi atingis la monton Hiei apud Kioto, nebulo ĉion kovris, nenio videblis. Tiam venis al mia menso : vi devas kovri vin, vi frostas. Tamen mia haŭto ne sentis malvarmon. Sed tiu ideo insiste revenis al mia menso. Finfine mi komprenis : en mia svisa montara regiono, se estas nebulo, la temperaturo falas. Do mia profunda cerbo kaptis forte tiun impreson kaj redonis ĝin al mi en tute alia mondoparto, kie nebulo povas esti kun alta temperaturo. Tiam mi povis malkovri, kiom forte kaj profunde mi ligiĝas al mia denaska regiono kaj klimato.

En Benino mi estas « jovo » blankulo. Afrikanoj vidante min ne scias, ĉu mi estas usondevena virino, komercistino, diplomato, helpanto, svedino, ?? Kelkaj eĉ salutis min per la vorto « Sinjoro », ĉar mi kutimas surhavi pantalonon. Same en Nepalo oni diris al mi « Sinjoro », ĉar mi tondas mian hararon kaj tion nepalaj virinoj neniam faras. Tiaj spertoj povas timigi iun homon. Rodolphe Christin skribas : « vojaĝanto devas meti siajn principojn, siajn kredojn inter krampojn. » Vojaĝado estas libervola mutacio.

Kelkaj personoj pli ŝatas vidi beston ol homon. Kamelo ne timigas kiel homo timigas...

Okaze de vojaĝado okazas kolizioj : sur plaĝo en Greklando turisto vidas ŝuon de mortinta enmigrinto. En Fortalezo okaze de UK en 2002 mi restadis en hotelo ĉe la maro kaj admiris kuŝantajn ŝipojn sur la sablo, sen tuj kompreni, ke tiuj renversitaj ŝipoj fakte estis domoj por malriĉuloj. Diversaj mondoj renkontiĝas, kolizias.

Foje okazas ŝanĝoj post iu vojaĝo. Aldous Huxley skribis : « Vojaĝante vi perdas viajn konvinkojn same facile kiel viajn okulvitrojn, tamen estas pli facile trovi okulvitrojn. » Naturo, ĉefe montaroj, ofertas belegan pejzaĝon kaj danĝeran medion. Tie homo sentas sin nuda kaj vera. Ŝvitiga grimrado, pura aero. Same kiel naskiĝo. La vojaĝanto malkovras multajn novajn aĵojn kaj aspektojn, devas ordigi, atingas universalaĵojn. El tio naskiĝas solidareco.

Oni povas plani rendezuon. Oni ne povas plani renkontiĝon.

Vojaĝoj malligas kaj religas.

Vojaĝi = provi. Per la piedoj. Per la haŭto.

La vojaĝo komenciĝas tie, kie mi ne estas, tio estas post la pinto de miaj piedoj. Jen ĉina proverbo pri la sama temo : « Vojaĝo el mil kilometroj komenciĝas per la unua paŝo. »

Ĉu esperantistoj estas kutimaj aŭ ne-kutimaj ekster-ordinaraj turistoj?

Esperantistoj estas tre bonŝancaj, ĉar ili povas malmultekoste turismumi per Pasporta Servo. La plej feliĉaj inter la esperantistoj estas la fervojistoj, ĉar ili povas vojaĝi per Pasporta Servo kaj havas rabaton en la trajnoj.

Se iu persono dediĉis tempon al lernado de Esperanto, oni povas supozi, ke tiu persono havas la deziron ektilati kun plej diversaj homoj. Do scivolemo ekzistas. Tio estas pozitiva antaŭsupozo por fariĝi respektoplena turisto.

Pro la forigo de la lingva baro esperantistoj kunvenas kun lokanoj. Ni havas tiun eblon. Ni ĝuas tiun vojaĝmanieron. Ni estas enorme bonŝancaj pro tio. Ĉu aŭtomate la kontaktoj estas pozitivaj, respektoplenaj ? Ne nepre. Tio dependas de nia eduko.

Kio pri **respekto** al la homoj ? al la kulturaj monumentoj ? al la naturo ?

Se vi alvenas kun viaj ideoj pri la socio de la vizitata lando, vi ne respektas la loĝantojn. Se vi ne sekvas iliajn konsilojn, vi ne respektas la loĝantojn. Se vi eniras japanan loĝejon kun ŝuoj ĉe viaj piedoj, vi ne respektas la loĝantojn. Se vi prenas sandviĉon el via sako, kiam gasto kuris por vi manĝaĵon laŭ sia kutimo, vi ne respektas la loĝantojn. Vi alvenas kiel ŝtono ĵetita en ĝardenon.

Se mia gastiganto proponas viziton de la vilaĝo B, kiam mi volis viziti la vilaĝon A, mi ĉiam obeas blinde kaj iras al vilaĝo B. Ĉiam mi fidas la lokanojn. Ĉiam mi estis feliĉa pri tio. Inteligenta turisto kondukas kiel **spongo**. Li au ŝi **sorbas** la informojn, la impresojn, la rakontojn de la loĝantoj, indiĝenoj, aŭtoĥtonoj.

Riĉiga kontakto. Vojaĝanto devas alveni kun **scivolemo, observemo, atentemo, pacienco, klopodoj**. Vojaĝanto devas eniri regionon per prudentaj paŝoj.

Turisto ne povas ne fari erarojn. Se tio okazas, li / ŝi devas senkulpiĝi. Turisto devas adaptiĝi. Se vi ne kapablas adaptiĝi, ne iru. Restu hejme. Gastiganto devas informi, helpi, havi paciencon ankaŭ. Vojaĝi malrapide kaj restadi longe. La malkovrita regiono digestas vin. Vi devas relativigi vian kulturkodon. Iri tra lokoj, signoj, kodoj, popoloj ne utilas al fierulo. Neniu sukcesas fariĝi indiĝeno ; tiu, kiu provas, teatrumas.

Kelkaj personoj estas valoraj **PONTOJ** : ili estas kulturaj interpretistoj. Ili ankriĝas en sia kulturo, bone konas ĝin, havas pozitivan ligon al ĝi, fieras pri ĝi, kapablas kaj emas prezenti ĝin. Mi enorme ĝuis kaj ĝuas miajn restadojn ie en la mondo, ĉar mi renkontas tiajn **PONTOJN**. Mi estas tre feliĉa pri tio.

Respekto estas ne ĝeni, ne malpurigi, ne detrui.

Konstrui pozitivajn rilatojn kun la popolanoj sen juĝo, sen stereotipoj, sen kritiko. Diskrete, ĝentile, sen lasi iajn spurojn.

Estas hazardo, ke mi naskiĝis en Svisio. Mi ne povas fieri pri tio. Neniu kulturo estas pli valora ol alia kulturo. **Ĉiuj malsamaj, ĉiuj egalrajtaj**, jen slogano de Konsilio de Eŭropo.

Kiel instrui respekton ?

Por instrui, oni povas paroli, prelegi, admoni, klarigi. Oni povas diri al eŭropano : la planko de japana apartamento estas samnivela, samkvalita kiel la

lito, vi ne irus sur liton kun malsekaj malpuraj ŝuoj ; do bonvolu forpreni viajn ŝuojn enirante en japanan domon. Klarigoj helpas. Ricevante ilin, oni povas kompreni. Pli bone estas disponigi al la personoj, kiuj devas ricevi vian mesaĝon, okazon **sperti** ion. Pro tio ni metis en la programon de nia kongreso la aktivaĵon BAFA BAFA. Okaze de tiu momento la partoprenontoj **spertos** kulturŝokon kaj komprenos la situacion de iu persono, kiu alvenas en novan etnon.

En malfermita familio, kie diversaj gastoj venadas, infanoj al kutimiĝas al bunteco de la mondo kaj de la homoj. Tiel la tereno fariĝas favora al respektoplena aliro al aliaj etnoj. Mi kreskis en tia familio kaj mi estas tre feliĉa pri tio.

Klasinterŝanĝoj sub la lerta gvidado de instruistoj estas bona maniero gvidi lernantojn al konatiĝo kun alia etno, malfermado de junaj okuloj. Psikologia akompano, diskuto pri travivaĵoj endas, por ke tia « kolizio » estu fruktodona. Tiaj interŝanĝoj estis granda parto de mia profesia vivo. Mi estas tre feliĉa pri tio.

Kiam junuloj fariĝas studentoj kaj kapablas solaj vojaĝi, studa restado monatojn longa en alia lando estas tre valora maniero konstati pri la ĝusta valoro de sia kulturo kaj malkovro de same valora alia kulturo.

Profesia restado en alia landoparto aŭ mondoparto ebligas malkovron de aliaj moroj. Tio okazis al mi : unue mi parolis pri *ekzilo* en Alemanio, la germanparola parto de mia landeto. Poste tiu restado tre plaĉis al mi kaj ebligis al mi akiri multajn geamikojn kaj novan lingvon la svisgermanan. Tia evoluo eblis, ĉar mia edzo kaj mi inventis oceanon inter Alemanio kaj nia franclingva regiono, kaj tiel atingis, ke Alemanio fariĝis ekzota. Do ni havis freŝan intereson malkovri ĝin. Mi estas tre feliĉa pri tio.

Per rolludoj instruisto aŭ kursgvidanto povas meti la partoprenantojn en renkonta situacio. Imagu jenan temon :

Persono A estas koreo, kiu preparis zorgeme altkvalitan kimĉi (tipa korea plado kun multe da salo) por eŭropdevena gasto. Persono B el Eŭropo devas pro sana kialo manĝi kun malmulte da salo. Ekparolu ! Solvu la dilemon !

Michel : « Ni devas instrui vojaĝ-etikon.

Pli lerni ol preni.

Pli aŭskulti ol paroli.

Pli observi ol juĝi. »

Nuntempe ekologia turismo estas naskiĝanta. Ĝi postulas, ke

- Homgrupo alvenanta estu malgranda
- Decidpovo estu ĉe la indiĝenoj
- Volo vivi kiel indiĝenoj, uzi iliajn tranoktejojn kaj manĝaĵojn.

Harmoniigi unuopaĵojn kun universalaĵoj.

Goethe, germana verkisto, pri vojaĝado : « Vojaĝu kun du sakoj : unu por doni, unu por ricevi. »

Pitagoro, greka sciencisto : « Forlasu larĝajn stratojn, uzu padojn. »

Kvar kompasdirektoj laŭ Jacques Lacarrière, franco : « malkovri, koni, kompreni, raporti ».

Pascal Dibie, franca etnologo : « Vagadi estas lernobjekto. Nenion fari estas arto. Lerni kiel rigardi estas tekniko. »

La nuntempaj teknikiloj ebligas ligon al la hejmlando, tiel ke oni neniam vere estas for. Ĉu ni bedaŭru tion ?

Vojaĝanto adoptas, adaptas, adaptiĝas.

Adaptiĝi por adoptiĝi.

Franca proverbo : en Romo agu kiel romloĝanto.

Tuarega proverbo : enirante iun landon, vivu laŭ ĝiaj kutimoj.

Kapablo adaptiĝi abundas, kie inteligenteco abundas. Tion diris al mi kuracisto.

Konklude mi citas Hans-Christian Andersen, dana verkisto ; li ekkriis en sia junaĝo : « Jes, vojaĝi, vojaĝi, tio tamen estas la plej feliĉa sorto ! kaj tial ni ankaŭ ĉiuj vojaĝas ! ĉio vojaĝas en la tuta universo ! eĉ la plej malriĉa viro posedas la flugilan ĉevalon de la penso, kaj se li fariĝos malforta kaj maljuna, tiam la morto tamen kunprenas lin sur la vojaĝo, la granda vojaĝo. »